# Dansk ESPERANTO-BLAD

UDGIVET AF
ESPERANTIST-
FORENINGEN
FOR
DANMARK

★

ELDONATA DE
CENTRA DANA
ESPERANTISTA
LIGO

★

29. ÅRG.
DECEMBER 1957
NUMMER

12



**DANSK ESPERANTO-BLAD**

udkommer den 15. i hver måned.

Stof må være redaktøren i hænde senest den 25. i den foregående måned.

Redaktør: *Ole Nederland*, Primulavej 61, III, Odense.

Ekspedition: C. *Graversen*, Borgergade 48, Esbjerg. Postkonto 57274.

Abonnement: 8 kr. pr. år. Eksterlanda jarabono: 6 d. kr. aŭ 10 respondkuponoj.

## 25-jara feliĉa kunlaboro

*estas la titolo de la unua-paĝa bildo, kiu montras du danajn esperantistojn, sendiskute inter tiuj kiuj donis al nia landa movado viziaĝon.*

*Krom la komuna 25-jara jubileo en aŭgusto, kiel jam menciite f-ino Noll ĉijare estas esperantisto 50 jarojn. Kaj en oktobro s-ro Friis festis 30-jaran esperantistan jubileon!*

Duoblajn gratulon kaj dankon meritas neniuj pli ol la du jubileantoj.

## Kopenhaga Zamenhofa Festo

okazos dimanĉon la 15-an de decembro 1957 je 20-a horo en Skt. Andreasordenens Selskabslokaler, Frederiksberg Allé 11.

La programo anoncas i. a.prezenton de la skeĉo „Danĝera Eksperimento" (personoj: Antonius Andersen, Borghild Bense, Ejnar Larsen), festparoladon, komunan kaftablon kaj balon al la muziko de la orkestro.

Biletoj kostas 2 kronojn. Bonvolu antaŭmendi biletojn ĉe la kasistoj de la kopenhagaj Esperanto-kluboj.

*La aranĝantoj:*

*Amager Esperanto-Klubo. Fervojista Esperanto-Klubo. Komuna Konversacia Klubo. Kopenhaga Esperanto-Klubo. Kopenhaga Grupo de Kristana Esperantista Ligo en Danlando. Laborista Esperanto-Klubo. Studenta Esperanto-Klubo.*



## D. E. F. meddeler:

at feriekursus i Esperanto på Den internationale Højskole i HELSINGØR afholdes næste sommer i tiden 19. — 26. juli.

at efterårskursus 1958 på Idrætsskolen i Vejle afholdes 19.— 26. oktober.

at Margrete Saxl's DAŬRIGA KURSO POST CSEHKURSO er udkommet i ny udgave. Bogen udkom første gang i 1937, men har været udsolgt de sidste 5—6 år. Efterspørgslen har været så stor, at vi har besluttet at udsende nyt oplag. Den er beregnet for E-lærere. Pris 12,— kr.

at mange endnu ikke kender vort korrespondancekursus KLERIĜU, som er beregnet for meget viderekomne. Det er udarbejdet af vor ekspert, s-ro Graversen, Esbjerg, og består af 18 lektioner, som kan gennemgås i løbet af 8 måneder. Skriv hertil for at få lidt nærmere oplysninger om det.

at s-ino POZENEL fra Ljubljana har holdt foredrag og vist lysbilleder om sit fædreland Jugoslavien i 18 danske Esperantoforeninger i november måned. Et lignende antal foreninger har bestilt skoleinspektør F. FÖTINGER i februar måned. Hvis Deres forening endnu ikke har bestilt ham, kan det nås endnu.

DANSK ESPERANTO-FORLAG
Ingemannsvej 9, AABYHØJ

## Nova klubo

La Esperanto-klubo en Nyborg petis aliĝon al CDEL. Ni bonvenigas la novan klubon en nia rondo kaj deziras al ĝi multan sukceson por ĝia laboro en Nyborg.

*S. D.*

# La kursoj en Vejle



Neniam antaŭe la aŭtunaj kursoj en Vejle altiris tiom da partoprenantoj kiom ĉijare. Dum unu memorinda semajno 40 esperantistoj — ĉefe danoj — lertigis sin, diskutadis, amuziĝis, aŭskultis prelegojn, vidis filmojn kaj faris belegajn promenojn en la bunta arbara regiono, kiu ĝuste dum tiu semajno prezentis ĉion dezireblan pri natura beleco.

Kiel kutime la sporta altlernejo estis la kadro de la aranĝo, ĉijare kadro iom malorda, ĉar oni alkonstruas, kaj la estro de la lernejo, s-ro *Sv. Å. Thomsen,* promesis vere paradizajn cirkonstancojn venontaŭtune. Kiel kutime la aranĝinto de la semajno estis s-ro Friis, kaj ne estas necese aldoni, ke ĉio pro liaj zorgaj preparoj funkciis glate . . . kiel ankaŭ kutime.

Io nekutima estis la nombro de kursoj, kiu ĉifoje estis 4. — S-ro *Søgård-Hansen* gvidis la komencan kurson, f-ino *Ida Christensen* la konversacian, s-ro *Moravec* la perfektigan kaj *Ole Nederland* studrondon por instruistoj, kiuj entreprenos infanajn kursojn. El la vesperaj programoj speciale menciinda estas la karavanfesto, en kiu ĉeestis ĉ. 80, inter ili multaj partoprenintoj en la karavanoj de Friis. Ni vidis la belan ĉijaran karavanfilmon krom kelkajn interesajn filmojn de Sv. Å. Thomsen.

En alia vespero s-ino Pozenel el Jugoslavio rakontis kaj montris lumbildojn pri sia lando. En tria s-ro Peter Zacho rakontis pri vojaĝo al la festivalo en Moskvo — ankaŭ kun lumbildoj —, kaj en la tago de la 30-jara esperantisteco de Friis tiu ĉi donis al ni la historion de sia ampleksa agado, kaj veraj historiaj dokumentaĵoj montris sin la amuzaj filmoj (ĉ. 20-jaraj) pri kursoj en Elsinoro kaj Hadsten.

La finfesto la lastan sabaton en la vespero estis festa punkto de la semajno en Vejle, kiu do ankaŭ ĉijare donis sian kontribuon al la vera vivo de la dana Esperantomovado.

# Leonid Vasiljef mortis

Kun granda doloro ni eksciis la 11-an de novbr. pri la morto de nia tre ŝatata kaj konata samideano, s-ro Leonid Vasiljef. La kopenhagaj esperantistoj diris al li la lastan adiaŭon dum la funebra ceremonio, kiu okazis la 17-an, en la krematorio; multaj belaj florkronoj ornamitaj per rubandoj kun signaturo estis submetataj ĉe la piedo de la ĉerko. Nian simpatian kunsenton ni sendas al la edzino de s-ro Vasiljef, samideanino Martha Nørlyk, kun kiu li edziĝis antaŭ kelkaj monatoj, kaj al liaj du bonaj amikinoj, f-inoj Ida Christensen kaj Nina Mollerup, ĉe kiuj li trovis hejmon dum la multaj jaroj post la morto de sia antaŭa edzino.

Pro manko de loko kroniko pri V. nur aperos en la venonta numero de la gazeto.

# Donacemo - dankemo

## Raporto pri la helpo al Hungario

Tuj post la malfeliĉaj okazaĵoj en Hungario diversaj danaj esp-organizaĵoj iniciatis helpagadon. Oni baldaŭ kunigis tiujn en *Komuna Esperanto-Helpo Dan-Hungara,* kiun gvidis Gustav Kühlmann flanke de CDEL kaj Poul Thorsen flanke de Komuna Konversacia Klubo kun subteno de DEFA kaj DLEA (kiu lasta ankaŭ subtenis la SAT-solidarservon).

Post negativa sinturno al Ruĝa Kruco ni prove sendis per aparta vagono de la katolika helpservo *Caritas* 7 nutraĵpakaĵojn por la 5 partoprenintoj hungaraj en UK, Kopenhago, krom al d-ro K. Kalocsay kaj prof. L. Kökeny, gvidanto de hungara distribua komitato oficiala.

Post longa devojiĝo kaj certaj artifikoj por eviti hungaran doganon ĉiuj 7 pakaĵoj fine atingis la adresatojn. (Ni kunsendis kvitanckartojn, kiuj revenis).

Telefone oni komunikis el Budapeŝto, ke nutraĵoj ne plu estas tiom dezirataj (i. a. pro la dogano), sed tiom pli vestaĵoj.

Kun permesoj de koncernaj danaj instancoj ni do per ordinara poŝto sendis provpakaĵon, kaj ĉar ĝi bone atingis la celon, ni en rapida takto sendadis vestojn kaj ŝuojn, donacitajn aŭ aĉetitajn, en tre bona stato uzita. Entute ni sendis 12 pakaĵojn kun 155 kg da vestaĵoj, ĉio ordigita de s-inoj Kühlmann kaj Thorsen.

Alvenis kelkaj individuaj helppetoj el Hungario, eĉ de neesperantisto en germana lingvo! Ilin ni sendis — kune kun kelkaj danaj deziroj pri aparta helpo — al la hungara komitato, kiu komunikis, ke ĝi post esploroj plenumis preskaŭ ĉiujn niajn dezirojn.

Krom multaj personaj dankleteroj, i. a. de Julio Baghy, Lajos Marton, Pal Balkanyi kaj L. Domokos ni ricevis la suban skribaĵon, kiu povas konvene fini nian raporton:

Al la kunlaborantoj de la Komuna Esperanto-Helpo Dan-Hungara.

Tre karaj samideanoj!

Nun, kiam alvenis ankaŭ la lasta donacpakaĵo de niaj karaj danaj samideanoj, ni raportas al vi pri la disdono de la sendaĵoj.

La subteno el Danlando estas tre konsiderinda! La valoro havigita de la danaj samideanoj preskaŭ atingas la duonon de la ricevita helpo el ĉiuj landoj (ĉ. 10). Tiu ĉi komparo ne plimalgrandigas aŭ kritikas la alilandan helpon (ja ni multe dankas ankaŭ por la modestaj donacoj), tamen ni konstatas la elstaran rolon de la danaj sendaĵoj. Per tio la Komuna Esperanto-Helpo Dan-Hungara grave kontribuis al la plua evoluigo de la Esperanto-movado en alia malgranda lando.

(daŭrigota en la venonta n-ro)

---

## Al membroj de UNIVERSALA LIGO

### kaj abonantoj de La Praktiko

Karaj samideanoj. — Jen mi denove venas por en la nomo de UL peti vin ne forgesi la gravan signifon de la laboro por UNU MONDO.

Nun pli draste ol iam antaŭe la interŝtata situacio ilustras, kiom necese estas, ke la mondo unuiĝu kaj la popoloj lernu konduti dece.

— Por ĉi tio — kiel vi ja scias — UL laboras per ĉiuj fortoj.

Ĉar la fortoj de UL identas kun la kolektiva forto de ĝiaj membroj, mi petas vin: aldonu ankaŭ *vian forton,* ankaŭ por 1958.

Kaj membreco kaj abono kostos por 1958 la samon kiel ĉi-jare, t. e. minimume 15 kronojn (por soldatoj k. s. minimume 12 kr.).

Kun sincera danko pro via ĝisnuna helpo salutas vin samideane

via C. *Graversen.*

---

## La Teatraĵo Servo informas:

Ĉu vi ankoraŭ ne uzis la Teatraĵon Servon de CDEL? Eble vi havas la ideon, ke

# 43-a Universala Kongreso de Esperanto

*Mainz — 2.—9. aŭgusto 1958 — Germanujo*




*Tilmeldelsesblanketter* fås hos kongressens repræsentant: C. D. E. L.s Kongresrejse-afdeling, Prins Jørgensgade 4 A, København N., giro 70617.

| *Tilmeldelsesgebyr* | indtil 31/12 1957 | efter 1/1 1958 |
|---|---|---|
| Kongresdeltager ............ | kr. 48,00 | kr. 54,00 |
| Kongresdeltagers hustru/mand | „ 24,00 | „ 27,00 |
| Unge, ikke over 20, og studenter | „ 17,50 | „ 19,00 |

Medlemmer af UEA erholder rabat, kongresdelt. ÷ kr. 8,00
hustru/mand ÷ kr. 4,00

Tilmeldelsesblanket og gebyr sendes til ovenstående adresse.

*C. D. E. L.s Kangresrejseafdeling.*

---

Esp. kunveno ĉiam devas esti serioza afero? Sed ni ankaŭ kelkfoje bezonas ridi.

La Teatraĵo Servo helpos vin.

Ni nun disponigas al la kluboj 4 teatraĵojn, nome:

*La Kolbasoj,*
4 roloj, 4 kronoj.
*Danĝera Eksperimento,*
3 roloj, 3 kronoj.
*Granda kverelo pri bagatelo,*
3 roloj,, 3 kronoj.
*Leteroj kaj soldatoj,*
2 roloj, 2 kronoj (tre mallonga).

La gejunuloj tre ŝatas „ludi teatron", kaj vi fakte devas ion fari por interesigi la gejunulojn.

Vi ne bezonas havi la penon kopii la rolojn, skribu al la Teatraĵo Servo, Hartmannsvej 23, Hellerup, (A. I. Haastrup), kaj vi ricevos la kompleton, kiun vi deziras.

*A. I. Haastrup.*

## ESPERANTOKURSO EN RADIO I. B. R. A.

19,90 m 26,50 m 33,60 m

Ĉiun mardon je la 18,10-a horo okazas Esperantokurso gvidata de *Ernfrid Malmgren.* Li verkis por la kurso specialan lernolibron: „Allas Andra Språk — Esperanto". La libro, kiu enhavas multajn amuzajn ilustraĵojn, kostas 6 sved. kr.

## TURISTA SERVO POR BELGUJO

Petu ĉiujn turismajn informojn kaj prospektojn pri Belgujo kaj pri la belega belga marbordo, kontraŭ unu resp. kupono. — Donas informojn pri la Internacia Ekspozicio 1958 en Bruzelo, rezervas pensionon kaj hotelĉambrojn je moderaj prezoj, donas loĝadon malmultekostan en Esperantodomo: Tousseyn Camille, del. de UEA, Statiestr. 35, Sabbeke, Belgujo.

---

**Et Esperantokursus pr. brev**

på 12 lektioner koster 15 kr. — Forlang en gratis prøvelektion.

**ESPERANTISTFORENINGENS KORRESPONDANCEKURSUS**

*v/ G. Rasmussen, Lindøvej 2, Bogense*

# Princo Axel sendas leteron per Esperanto

La bela japana Esp.-gazeto „Revuo Orienta“ ekhavis la genian ideon turni sin al japanaj elstaruloj por proponi sian helpon en kontaktado al aliaj famaj personoj en la mondo.

La unua rezulto el tio estis letero de la japana Princo *Mikasa,* kiu vizitis Danlandon okaze de la inaŭguro de la transpolusa aerlinio. La letero estas adresita al la dana princo *Axel,* kiu samokaze vizitis Japanujon. La letero, tradukita de japanaj esp.-istoj kaj poste en la danan de s-ino *Roma Thorsen,* atingis la danan princon en la somero, kaj en la aŭgusta numero de „Revuo Orienta“ oni publikigis la respondan leteron de li al princo Mikasa.

„Revuo Orienta“ en la sama numero peras novan leteron, nome de fama japana sciencisto, *Kaoru Yasui,* al *Albert Schweitzer.*

## *Kristnaska trajno*

BONA KRISTNASKA DONACO al infanoj, kiujn vi deziras interesiĝi pri Esperanto, estas „Lommebog for Skoleelever“. Ĝi enhavas ĉijare artikolon pri Esperanto verkitan de J. Stig Hansen.

EN LA KRISTNASKAJ TAGOJ VI LEGOS ESPERANTO-LITERATURON, kompreneble, kaj per aĉeto de la katalogo pri Esp.-libroj el Aarhus Kommunebibliotek vi povos elekti inter 700 libroj. La katalogo (5 kr.) estas aĉetebla per „Dansk bibliografisk Kontor“, Nr. Voldgade 94, København K.

ESKIL SVANE, la konata kopenhaga esperantisto, pasigos la kristnaskon en Usono, kie li dum la unua duono de 1957 i. a. instruis pri Esperanto en Delaware kaj poste en Detroit.


VIA KRISTNASKA DONACEMO profitu al s-ro Gottfried Hofstätter, Schwimmschulstrasse 15, Steyr, Aŭstrujo, kiu deziras ricevi ĉiajn superfluajn esperantaĵojn por propaganda utiligo.

KRISTNASKA SKIFERIO okazos aranĝita de TEJO en vintra paradizo en Aŭstrujo. La aranĝo daŭros de 26/12 ĝis 5/1. Interesemuloj ankoraŭ povas aliĝi per la adreso H. Reiter, Salzburg, I, 557, Aŭstrujo. Se vi preferas Svislandon por skii, partoprenu en la tiea aranĝo dum la sama tempo kaj skribu al Esp.-Junularo de Svislando, Nordstr. 216, Zürich, Svislando.

UNUIĜINTAJ NACIOJ atingu pacan mondstaton en la nova jaro! Tion deziras ankaŭ UEA, kiu en kunlaboro kun Esp.-Ligo por Nord-Ameriko kaj UN elsendis UN-afiŝon kun Esp.-teksto okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj la 24-an de oktobro.

MULTAN MONON kostas ankaŭ aliaj aferoj ol kristnasko. En novembro oni publikigis la kalkulaĵojn de la 41-a UK en Kopenhago, kiuj bilancas per 86.322,01 kr.

DUA PARTO DE LA JARLIBRO de UEA aperis. Kiel ordinare ĝi enhavas multspecajn raportojn pri la aktiveco de UEA, i. a. raportojn el la naciaj sekcioj.



— Esperanto verŝajne eĉ ne havas literaturon?
— 3.000 volumojn, amiketo!

— Ĉu vere . . . Kaj kiom el ili vi mem legis?
— Mi mem . . . neniom . . . , sed mi konas iun, kiu legis „La forto de l' vero“.

### Karaj legantoj,

„LA KLUBA VIVO“ pro spacmanko ne aperas ĉifoje. — En la nova jaro la rubriko aperos principe per tre mallongitaj raportoj. — Sed krome ni aperigos *skemon, laŭ kiu vi ĉiumonate povos kontroli, kiuj kunvenoj okazos* ne nur en via propra klubo, sed ankaŭ en la najbaraj. NI TIAL PETAS,

(daŭrigo p. 124)

## Libro-servo de Centra Dana Esperantista Ligo

Hviddingvej 52 - Rødovre/Valby - Telf. 700474 - Giro 13652

### GAVEIDEER

| | |
|---|---|
| Infana Raso, de William Auld, poemoj, 22 × 16, 104 s. | kr. 12,60 |
| Koko krias jam, de Ferenc Szilagyi, noveloj, 232 s. | „ 12,60 |
| Eseoj I, de G. Waringhien, 232 s. | „ 12,60 |
| El la maniko, de Reto Rossetti, noveloj, 224 s. | „ 12,60 |
| Sinjoro Tadeo, de Adam Mickiewicz, 334 s., bind. | „ 10,00 |
| Kontiki, Thor Heyerdahl | „ 24,00 |
| Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj, dr. agro P. Neergaard | „ 22,00 |
| Fundamenta Krestomatio, de L. L. Zamenhof, bind. | „ 19,00 |
| Slipseholdere, forgyldte, med emblem | „ 4,00 |
| Skriveblokke med omslag, 100 blade, uden linier | „ 5,00 |
| Askebægre, 41. UK i København | „ 3,50 |
| Kongresmærkater, 41. UK i København, pr. ark (25 stk.) | „ 0,50 |
| Bordflag, silke, med ubetydelige fejl, nedsat pris | „ 2,50 |
| Grønne klæbestjerner, pr. 100 stk. | „ 1,50 |
| Julekort, nye, pr. stk. 15 øre — 12 stk. | „ 1,50 |
| Kuverter, pr. stk. | „ 0,05 |

Et stort udvalg af bøger fra 2,00 kr. haves altid på lager, ligesom vi fører alt i lærebøger, ordbøger til undervisning og selvstudium.

Endvidere tegnes her abonnement på vore mange udenlandske blade og tidsskrifter.

— memoru la tagon de l' libro — memoru la tagon de l' libro — memoru la tagon de l' libro —

memoru la tagon de l' libro memoru la tagon de l' libro memoru la tagon de l' libro




## LA KOKO KRIIS TRIFOJE

*pri sia bindita — ilustrita — alt-valora serio:*

POEMOJ

*Poul Thorsen:* Rozoj kaj Urtikoj (10,50 kr.).

FABLOJ

*K. Kalocsay:* Ezopa Saĝo (9 kr.).

NOVELOJ

*J. H. Rosbach:* Homoj kaj Riveroj (12 kr.). — (Vidu recenzon en oktobra DEB).




**La kooperativa eldonejo KOKO**

Randbølvej 4, - Kopenhago F. - Ĝiro 96.289

memoru la tagon de l' libro memoru la tagon de l' libro memoru la tagon de l' libro

— memoru la tagon de l' libro — memoru la tagon de l' libro — memoru la tagon de l' libro —

# HEROLDO
DE ESPERANTO

*Duonmonata internacia organo de la Esperanto-movado*

**Prezoj en 1958**

| | |
|---|---|
| Abono tutjara .......... | kr. 22,00 |
| Abono julio-decembro .. | kr. 10,00 |
| Anonceto ĝis 25 vortoj .. | kr. 3,50 |
| Anonceto 26 ĝis 50 vortoj | kr. 7,00 |
| **Anonco pokvadratcentimetre** | **0,60** |

*Pri HEROLDO-libroj petu libroliston*

**Dana peranto**

★ S-ino G. JAKOBSEN
Carit Etlarsvej 14,
Aabyhøj.
Poŝtkonto 54133.

# FOTO

## Aftryk

til meget fordelagtige priser. Således kun 26 øre for et 6 × 9. Ved 8 stk. og derover af samme negativ kun 22 øre pr. stk.

**Forlang prisliste!**

Mange års erfaring med forsendelsesforretning. Garanti for omhyggelig udført arbejde.

**Nia Foto,**
*Bjerringbro st.*
v/Henning Nielsen,

Telf. 357.
Giro 66122.


KE ĈIUJ KLUBOJ PLEJEBLE BALDAŬ INFORMU S-INON IBURG (Sct. Clemens, Fyn) PRI OKAZONTAJ KLUBARANĜOJ EN LA PERIODO 15/1—15/2. — La jarkolekto 1958 krome prezentos sin kun *nova koloro, paĝo por infanoj* kaj aliaj novaĵoj. La januara n-ro estos 16-paĝa *jubilea presaĵo de CDEL.* Ĝi enhavos plie multajn artikolojn ne trovintajn lokon en decembro, ekz. pri PETSKRIBO DE EADI AL LA INSTRUMINISTRO, PRI ESP. KAJ LA NOVA LERNEJLEĜO. — DEB per ĉi tiuj linioj finas sian 29-an jarkolekton. NI DEZIRAS AL ĈIUJ NIAJ LEGANTOJ FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON.

*La redaktoro.*


# DANSK VEGETARISK FORENING

varetager vegetarernes fællesinteresser. Der kræves intet løfte af medlemmerne. Kontingent 7 kr. årligt. Ægtepar 8 kr., *inkl.* abonnement på VEGETARISK TIDSSKRIFT. Forlang gratis prøvenummer. Adresse: Ågade 114, II, København N. Telefon: Gothåb 1163 u.

**Ni rekomendas al Esperantistoj**

restadon en nia unuaklasa hotelo. — Esperanto parolata.

*HOTEL DANIA*, Silkeborg. Tlf. 6 - 7 - 686.

☆ Esperanto-BOGTRYK

Indhent tilbud gratis og uden forbindende hos Sønderjyllands ældste og største bogtrykkeri —

MODERSMAALETS Trykkeri

Haderslev — Telefon 22031


A-S Modersmaalets Trykkeri - Haderslev

KUL